

Laborista Esperantisto

16DE JAARGANG No. 11 — 15 NOV. 1947
VERSCHIJNT MAANDELIJKS
ABONNEMENT f 2.25 PER JAAR. LOSSE NUMMERS f 0.20. VOOR LEDEN GRATIS

Redactie: Roelantstraat 4, Amsterdam (West).
Administratie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: Roelantstr. 4, A'dam-W.
Postgiro Amsterdam 331133.

ORGAAN VAN DE BOND VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN F.L.E.
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

Jeugd — doe zelf!

Gedurende enkele weken is er in ons land een republiek gevestigd geweest — een staat in de staat. O, heel onschuldig, al heette het ook een Rode Nederzetting. Die nederzetting beperkte zich tot Vierhouten, waar de A.J.C. op de Paasheuvel placht te zetelen. Het was de jeugd die hier de deugden van een ware democratische republiek, met eigen grondwet en gemeenteraden etc., leerde kennen.

Er zullen wel wetten gemaakt zijn en besluiten genomen voor de toekomst. Als ouderen, die de jeugdbeweging nog slechts uit de verte kunnen gadeslaan, weten wij niet welke wetten er al zo zijn ontworpen; wij hopen voor de jeugd, dat men ook toegekomen is aan een wet op het onderwijs. Een eerste vereiste is, zelf te doen, wat anderen nalaten. In ons land hebben wij critiek op de minister van onderwijs, die het 8e leerjaar voorlopig de nek omdraaide en daardoor aan vele arbeiderskinderen de mogelijkheid ontnam nog datgene te leren, wat in hun later leven van pas kan komen. O.m. komt op verscheidene scholen het Esperanto-onderwijs in gevaar. Er zullen daar in de jeugdrepubliek meer slachtoffers aanwezig zijn geweest van bezuinigingsmaatregelen op onderwijsgebied, niet alleen uit ons land. Aan critiek daarop zal het in de Paasheuvelrepubliek zo min ontbroken hebben, als in het dagelijkse leven.

Hebben nu de raadgevers van die jonge republiek daaruit de consequentie getrokken, dat dus de republiek een onderwijsprogram heeft vast te stellen en *verplicht* onderwijs ingevoerd dient te worden in de jeugdbeweging zelf, tot een bepaalde leeftijd, in vakken naar keuze en aanleg?

Met dwang wordt niets bereikt, zullen verscheidene „men"-s tegenwerpen en de jeugd komt bijeen om zich te amuseren, enkele of meer weken uit te kunnen zijn. Heel goed. Maar de A.J.C. is een culturele jeugdorganisatie, die meer nastreeft dan enkel maar spel en vermaak. De vorm van een „republiek", hoe symbolisch ook bedoeld, wijst in die richting. Zulk een symbolisch samenzijn vraagt meer begrip van de deelnemers aan dergelijke jeugdkampen, hetgeen trouwens het gehele program uitwijst. De leden der rode nederzetting doen beloften en nemen plichten op zich, die zwaar zouden wegen, als zij niet jong waren.

Uit de verslagen der A.J.C. is ons wel gebleken, dat het met de clubs en cursussen van meer serieuze aard, nog maar matig gesteld is. Wat wij van de Staat verlangen, dat zij verplicht onderwijs voorschrijft, mag men zeker verlangen van een „Staat" die zich ten voorbeeld wil stellen en zal zeggen hoe het behoort toe te gaan in een democratische republiek.

En dan behoort in een werkelijk democratische republiek, waarin zo vele volken met verschillende talen zijn bijeengebracht, niemand het gevoel te hebben een minderheid te zijn, die niet verstaan wordt. Daar zijn alle talen evenwaardig: *maar één taal zij er de voertaal.* Niet de taal van de toevallige meerderheid, maar de taal van niemand, die ieders taal is: *het Esperanto.*

Als wederom de jeugdrepubliek bijeenkomt, hopen we, dat haar leden dit aan hun parlement duidelijk maken en besluiten tot het *verplichte onderwijs in Esperanto* voor alle leden der socialistische jeugdbeweging en het verbod aan internationale jeugdkampen deel te nemen, als men niet voldoet aan de primaire eis, elkaar te kunnen verstaan en begrijpen. Mogen de, in dit opzicht, conservatieve en weinig progressieve jeugdleiders, zelfs in deze tijd waarin meer dan ooit duidelijke taal verlangd wordt, er nog behagen in scheppen, gloedvolle woorden te wijden aan de kameraadschap, die spreekt van hart tot hart, wij hopen, dat de jeugd verstandiger zal wezen en niet tot in der eeuwigheid het internationale analfabetisme tolereren, in welke staat zij gedoemd is te blijven, als zij zich zelf daaraan niet ontworstelt.

Want weet, gij arbeidersjeugd, ook onze arbeidesbeweging is niet in staat, het schoolonderwijs zó te doen verbeteren, dat gij ooit voldoende vreemde-talenonderricht zult verkrijgen. En wetende, dat ook het in dit opzicht meer begunstigde deel der bevolking van alle landen, nog maar een pover figuur slaat in internationale besprekingen en bijeenkomsten, zal veel van zulk onderwijs ook van weinig nut blijken.

En weg staat er open voor de jeugd: dat is het leren en gebruiken van Esperanto als internationale taal.

Gij zijt jong. Binnen een paar jaar zijt ge volkomen in staat U te verstaan, in woord en geschrift, met mensen uit alle landen der wereld. Stelt niet uit tot het te laat is, want, ouder geworden, zult ge U misschien eveneens uit gemakzucht laten verleiden, na te laten, wat gebiedende plicht is van hen die een rol in de arbeidersbeweging spelen: de arbeiders van alle landen te verenigen door Esperanto.

Aan de jeugd is de toekomst.

Wij ouderen, die reeds vele jaren Esperanto kennen, hebben het voorrecht een blik in die toekomst te kunnen werpen. Wij hebben vrienden in alle mogelijke landen ter wereld: van IJsland tot in Australië, van Yokohama tot San Francisco en geen land in Europa is ons vreemd. Onze Esperantocongressen zijn werkelijk internationaal, daar spreekt men geen gebarentaal — daar spreekt men inderdaad van hart tot hart. *Vervolg blz. 82*

ALVOKO al la Nederlanda Esperantistaro

Karaj Geamikoj,

Kiam en Majo 1945a nia lando estis liberigata, por ni, Nederlandanoj, la suno leviĝis. Finiĝis teruro, timo kaj subpremado, detruo kaj homĉasado, kaj plej grave — finiĝis ankaŭ malsato.

Ni ne intencas memorigi vin pri la terura vintro 1944a-1945a. Precipe la grandurbanoj nevolonte parolas, eĉ ne ŝatas pensi pri tiu mizera tempo. Ankaŭ ni ne ŝatas refrapi malnovajn vundojn, sed ni bezonas ĉi tiun enkondukon, nur por memorigi vin pri niaj sentoj de profunda ĝojo kaj danko, kiam en Aprilo 1945a flugmaŝinoj eljetis pakaĵojn da nutraĵo, kaj kiam poste la Kanadanoj alportis amasojn da varoj, kiujn ni dum longa tempo ne povis akiri. Iom post iom la cirkonstancoj ĉi tie pliboniĝis, kaj kvankam la porciumoj nunaj certe ne estas abundaj, ni povas diri, ke en Nederlando neniu plu malsatas. Ĉu ni sufiĉe konscias, kiom tio signifas?

Sincere, geamikoj, ni, male, ofte emas grumbli, kiam iu artiklo estas malfacile akirebla, kaj tro baldaŭ forgesas, kia estis la stato antaŭ nur mallonga tempo.

Jes, amikoj, por ni la suno leviĝis, sed por aliaj ĝi subiris. Ni nur legu la jurnalojn, por eksciii, kia estas la stato en pluraj najbaraj landoj, koncerne la nutradon.

Regas tie la „nigra morto" — la malsato — en plej terura formo. En sia malespero oni strikas, por protesti kontraŭ la treege malgrandaj porciumoj, kiuj eĉ ne atingas la nivelon de la plej necesa minimumo.

Unu el la urboj, kie la malsato plej severe regas estas Vieno. Vieno, la iama urbo de gajo, senzorgeco kaj muziko, nun estas dezerto de griza mizero.

El leteroj, ricevitaj el tiu ĉi grandurbo, ni eksciis kiom oni tie suferas, kiom malgaje kaj senespere vivas la Vienanoj. Kelkaj el ni sendis pakaĵon da nutraĵo. Kortuŝaj estis la esprimoj de danko, plurfoje ripetitaj en unu letero. Legante tian leteron, oni konscias kiom riĉaj, ni, Nederlandanoj, ankorau (aŭ jam) estas, kaj kiom da feliĉo kaŭzas simpla pakaĵeto en samideana familio, malproksima de ni.

Ni priparolis la eblecon, komune fari ion, por organizi pli efikan helpon. Sed nia lando ankoraŭ apartenas al la t.n. „helpataj landoj". Ne eblas aranĝi grandskalan kolektadon de nutraĵo. Tio estas en la nunaj cirkonstancoj malpermesata. Sed — en niaj cerboj kreskis ideo, kiu ŝajnas al ni efektivigebla. Ni ofte legis, ke iu urbo „adoptas" urbon aŭ vilaĝon, kiu multe suferis pro la milito.

Ĉu ni ne povus apliki tiun rimedon tiel, ke Nederlanda esperantisto (aŭ esperantista familio) adoptu samideanan familion en Vieno?

Ĉar estas permesata de tempo al tempo sendi pakaĵeton da nutraĵo eksterlanden.

Oni rajtas forsendi nur malmulte (duonon de la 14-taga porciumo). Ni bone konscias, ke ni tiamaniere ne forigos la tutan mizeron el la regno de Reĝo Malsato, sed nia samideana devo ordonas al ni, fari tion, kion ni povas. Kaj, geamikoj, nur la konscio, ke ni alportos iom da feliĉo en samideana rondo, ke ni posedas la potencon krei rideton da feliĉo sur infanvizaĝo, estas por ni mem feliĉo kaj rekompenco. Gesamideanoj; nia ideo estas modesta propono al la Nederlanda esperantistaro. Ni esperas ke ĝi trovos aprobon en via animo, sed ankaŭ resonon en via koro.

Se vi samopinias kun ni, ke estas nia samideana devo, ion fari, sendu vian nomon kaj adreson al jena adreso: S-ro C. J. Timmerman, Herzogstraat 40, Den Helder.

Nia provizora tasko estas kolekti adresojn de Vienanoj kaj de helpopretaj Nederlandanoj kaj esplori ĉiajn eblojn, koncerne la forsendadon de pakaĵoj. Poste vi ricevos pli detalajn informojn. Ni tre aplaŭdus la helpon de la landaj organizaĵoj, ĉar kun ilia subteno ni eble povus disvastigi nian helpon al aliaj malsatantaj lokoj. Se vi simpatias kun nia ideo, sed absolute ne povas malhavi ion, vi tamen povas helpi per monsubteno, ĉar ankaŭ ĉiokaze mono estas necesa (cirkuleroj, leteroj, poŝtmarkoj k.t.p.). Vi povas sendi aŭ ĝiri al suprenomita adreso (postĝirkonto 227251).

Gesamideanoj, montru vian bonan volon, helpu laŭpove kaj tiel plenumu vian Esperantistan devon.

La estraro de „LA-NORDA-STELO".

ESPERANTO-LAAN IN ARNHEM.

Zaterdag 6 October, des namiddags 3 uur vond in Arnhem de onthulling plaats van het nieuwe straatnaambord „Esperantolaan", dat het door het oorlogsgeweld beschadigde bord moest vervangen.

De plechtigheid stond onder leiding van k-do Henstra, de voorzitter van het plaatselijk comité van de samenwerkende Esperanto-verenigingen.

Als vertegenwoordiger van het gemeentebestuur verrichtte wethouder Klompé met een waarderende toespraak de onthulling. Drs. Makkink sprak over het 60-jarig bestaan van Esperanto, ter gelegenheid waarvan de vernieuwing van het bord plaats vond.

Na de plechtigheid reden de genodigden per autobus naar restaurant „Bordelaise" waar de thee geserveerd werd en Drs. Makkink een lezing hield over het Bureau „Esperanto en de Wetenschap" waarvan hij secretaris is.

Het bord ziet er keurig uit. Esperantisten, die onze stad een bezoek brengen, mogen niet verzuimen, het eens te gaan zien! P.R.

PROPAGANDO.

En „De Gong", monata gazeto por la pacientoj de la sanatorio „Hoog-Laren" regule aperas Esp. artikoletoj, verkitaj de kelkaj el la pacientoj mem. La rezulto de tiu agado estis ke jam pasintjare en „Hoog Laren" okazis Esp.-ekspozicio kaj kelkaj pacientoj anoncis sin por sekvi elementan kurson. Cetere ankaŭ inter la anoj de niaj skribaj kursoj troviĝas pacientoj el „Ho-La".

Jam antaŭ du jaroj k-do Wijn el sekcio A'dam X komencis la propagandon kaj najbara paciento, instruisto, estis tiel infektata de lia idealismo, ke ĉi tiu lasta ne nur lernis Esperanton, sed nun ankaŭ instruas aliajn.

K-doj, daŭrigu tielmaniere! Bedaŭrinde por vi, vi havas multe da tempo dum vi kuŝas tie, sed efektive, vi ne povas pli bone uzi ĝin. D.K.

Zó konden uw internationale nederzettingen zijn, zó zoudt gij vrienden kunnen hebben in elk land, ook al kent gij de taal van het land niet.

De ouderen waren uw wegbereiders in menig opzicht. De vakbeweging, uw partij brachten licht op uw weg. Zij brachten u internationale kameraadschap en saamhorigheid bij, maar één belangrijke boodschap verzuimden zij, enkelen daargelaten, u te brengen: dat ge allereerst moet trachten elkaar te verstaan.

Welnu, maakt dat verzuim eigenerbeweging goed. Wacht niet op wat van bovenaf gebeurt. Beslis en doe zelf, vóór de tijd aan u voorbijgaat.

H. W. A.

RADIO-HILVERSUM.

La 21an de novembro, vespere de 18.45 ĝis 19.00, ondo: 415 m. S-ro D. de Boer pri „Ĉar kiel la korpo estas unu...."

Dankon oni esprimi al N.C. R.V. postbus 5, Hilversum, Nederland.

La 16an de decembro, posttagmeze ± je la 16a horo, ondo 301 m. „La Verda Kabaredo".

La 3an de januaro, posttagmeze ± je la 16a horo, ondo 415 m. S-ro P. W. Baas pri „Esperanto en la lernejojn". Dankon pri ĉi lastaj du elsendoj oni esprimu al VARA, Postbus 175, Hilversum.



ESPERANTO 60-JARA

Skizo pri la evoluo de la lingvo literatura

de G. J. DEGENKAMP

Enhavo: Enkonduko — Rerigardo — La fonto — Eksperimentoj — La klasikuloj — Modelo — Skuoj — Disciplino — Kvanto kaj kvalito — Reviglîĝo — Perfektigaj provoj — Logika aŭ.... — Novaj direktoj — Diversnacieco — Stagno kaj reviviĝo — Perspektivoj.

Por ke la leganto povu kompari la lingvon el la komenca periodo kun la lingvo nuna, la aŭtoro aldonis la novelon „Neĝa blovado" de A. Puŝkin, tradukitan en 1888 de A. Graborski, kaj ĉapitron el „Cezaro" de M. Jelusiĉ, tradukitan en 1934 de I. Rotkviĉ.

Prezo (kart.) ƒ 1.75. (broŝ.) ƒ 1.30.

LIBROSERVO F. L. E.
Roelantstr. 4 — Amsterdam W. — Postgiro 111278

BIZONDERE AANBIEDING VOOR DE KOMENDE FEESTDAGEN!!

25% korting

Om onze leden de gelegenheid te geven zich op voordelige wijze lees- en studieboeken aan te schaffen, stellen wij voor de a.s. feestdagen een aantal paketten beschikbaar voor de prijs van f 5.— plus verzendkosten.

Elk pakket bevat zes werken en wel:

1. **Esperanto Krestomatio** (gecart.), het nieuwe leesboek voor de A-examens.
2. **Esperanto 60-jara** (ingen.), onze jubileumuitgave.
3. Naar keuze:
   Saltego Trans Jarmiloj (geb.),
   Du Majstraj Noveloj (geb.) of
   La Nekonata Konato (geb.).
4. Naar keuze:
   La Forta de l' Vero (ingen.) of
   Plí ol Fantazio (ingen.).
5. Naar keuze:
   Historio de Esperanto of
   La Almozulino de la „Pont des Arts".
6. Naar keuze:
   El la Mitologio de Antikvaj Popoloj,
   Aventuro en la Novjara Nokto of
   Dua Legolibreto.

De waarde van de pakketten volgens de catalogusprijzen is plm. f 7.—, zodat u een korting geniet van ruim 25%. Benut deze gelegenheid voor eventuele cadeau's!

DE TAAK DER JEUGDLEIDERS.

Onder bovenstaande titel publiceerden wij in het October-nummer van dit blad een artikel waarin de jeugdleiders in het algemeen en die der A.J.C. in het bijzonder op hun tekortkomingen werd gewezen ten opzichte van Esperanto.

Naar aanleiding hiervan schreef het hoofdbestuur van de A.J.C. ons, dat wij waarschijnlijk niet op de hoogte zijn van het feit, dat een vrij groot aantal van haar afdelingen deze winter een esperanto-cursus heeft georganiseerd.

Inderdaad is ons dit bekend, maar zolang Esperanto in het werk van de jeugdbeweging niet die plaats inneemt, waar het — gezien de dringende noodzaak — recht op heeft, blijven wij bij onze bewering, dat o.i. de jeugdleiders in dit opzicht ernstig in hun taak tekort schieten.

Moge de tijd niet ver meer zijn, dat in alle lagen der jeugdbeweging de noodzaak van een internationale taal wordt begrepen en dat men met kracht zal mede strijden voor de totale invoering van Esperanto.

A.M.D.K.

VACANTIEBELEVENISSEN.

Zeer velen onzer leden bezochten dit jaar het S.A.T.-kongres in Aarhus. Hoeveel van hen hebben de gelegenheid te baat genomen om van hun ervaringen een verslagje te maken voor hun vakblad of ander verenigingsorgaan? Verscheidene kleine bladen nemen gaarne vacantie-indrukken op, vragen er zelfs om. Als men niet durft schrijven voor de grote pers, wel, onze leden zijn toch zeker in staat een vacantieverslagje te maken over hun reis naar en belevenissen in Denemarken, waarin het Esperanto zulk een belangrijke rol speelde? Bedenkt, er zijn vele eenvoudige wegen om propaganda te maken.

H.W.A.

NOOIT TE OUD OM TE LEREN!

„Rio Esperantista", het orgaan van de Bond van Esperantisten in Rio de Janeiro, vermeldt, dat de geneeskundige Alfredo Antonio Osorio, 104 jaar, thans deelneemt aan een cursus in Esperanto!

Zodat nu ook het argument „ik ben er te oud voor" heeft afgedaan.

REZOLUCIO.

Akceptita de la 12-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista.

La Kongreso:

1. Sincere ĝojas pri la reunuiĝo de la neŭtrala internacia Esperanto-Movado.
2. Esprimas la deziron ke U.E.A. akceptu Flandra-n Ligo-n Esperantista-n kiel plenrajtan landan Esperanto-Asocion.
3. Ree instigas ĉiujn internaciajn Esperanto-Organizajojn, neŭtralajn kaj ne-neŭtralajn, pristudi la starigon de tutmonda Esperanto-*instanco* kiu *reprezentu* senescepte ĉiujn esperantistojn.
4. Decidas komuniki tiun ĉi rezolucion al la Esperanto-gazetaro por ke ĝi veku ĝeneralan aprobon kaj simpation.

D-ro T. van Gindertaelen
Prez. Fl.L.E.

ESPERANTO EN LA SINDIKATARO.

Estas maloftajo ke iu propono rilate Esperanton troviĝas en kongresa proponaro. Tamen oni povas trovi ion tian en la kongresraporto de Nederlandse Vereniging van Spoor- en Tramwegpersoneel.

La teksto estas jena: La landa kunveno decidu peti al la estraro klopodi ke ankaŭ en NIAJ KONGRESOJ Esperanto estu uzata kiel parolilo kaj interkomprenigilo.

Klarigo: La uzado de Esperanto progresigos la interkomprenon kaj la pacon inter la popoloj.

La elspezoj por internaciaj kongresoj grave malaltiĝos."

Iu estarano, kiu ŝajne ankaŭ foje volis praktiki la lingvon, komencis paroli esperante sed jam baldaŭ montriĝis ke la kunvenantaro, tute ne komprenas Esperanton. Ĝi do postulis daŭrigi per la nacia lingvo. „Tio jam pruvas", diris la defendanto(?) „ke Esperanto nur utilas kiel interkomprenigilo inter DIVERSLINGVANOJ". Li konsilis senkondiĉe malaprobi la proponon. Tiel okazis.

Oni povas mallaŭdi la konduton de Esperantisto(?), kiu scias la celon kaj utilon de mondlingvo, persono, kiu havas gravan postenon en estraro kaj neniam praktikis Esperanton alie ol por moki la mondlingvanojn, sed aliflanke oni starigu la demandon, ĉu la proponinto sufiĉe bone faris la preparojn? Per la propono montriĝis ke li ne havas bonkomprenon pri uzado de mondlingvo, ĉar kiu racie pensanta homo volas anstataŭi sian nacian lingvon per Esperanto?

Esperanto nur servas bone dum internaciaj renkontiĝoj kaj certe ne dum PURE NACIAJ KUNVENOJ DE NE-ESPERANTISTOJ.

Estas kompreneble ke neniu nacia instanco povas akcepti tian proponon. Oni nepre evitu tion, ĉar ili tute ne servas iel ajn por Esperanto, male, oni donas al homoj, kiuj daŭre tute malatentas Esperanton, okazon primoki ĝin kaj ĝian anaron.

Kiam oni volas ke inertaj sindikatestraroj apliku Esperanton, oni devas unue prilabori la laborendan terenon kaj kiam la tempo favoras por atingi ion, oni tuj kaptu la okazon!

Neniam pensu, ke praktika uzado de mondlingvo aŭtomate efektiviĝos. Nur post longa daŭra tamburado, post efikplena propagando, oni atingos la celon!

Neniam lasu al nekonata esperantisto la taskon defendi tion, ĉar ofte montriĝas, ke anstataŭ defendi ĝin, li malutilas al nia afero!

Rim. de la Red.: Ankaŭ la propagando estas scienco, kiun oni devas lerni!

Petro de l' Breto.

21a Kongreso de S.A.T. en Amsterdamo!!

2a komuniko

Adreso de O.K.K.:
Sekr-ino H. Oudenhooven-Bishoff, Bestevaerstr. 127[3], A'dam-W.
Kasisto: B. Bultemeijer, Jan van Galenstraat 86[1], A'dam-W.



La kongreso okazos de sabato la 31a de julio ĝis merkredo la 5a de aŭgusto. Ĵaŭdon kaj vendredon la kongreso ekskursos.
Kongresa kotizo: antaŭ la unua de majo por S.A.T.-anoj po 7 guldenoj, (geedzoj 12 gld.). Por ne-S.A.T.-anoj antaŭ la unua de majo po 10 guldenoj, (geedzoj 17.50 guldenoj).
Post la unua de majo la kotizo respektive estos: por S.A.T.-anoj 10 gld. (geedzoj 15 gld.) por ne-S.A.T.-anoj 13 gld. (geedzoj 20 gld.).
Anoncu vin kaj pagu rekte al la kasisto de O.K.K.! Li ankaŭ prizorgos la loĝadon.
Oni pagu poŝtmandate aŭ pere de ĝirkonto de la komunumo Amst. Ankaŭ eblas pagi poŝtĝire al „S.A.T.-congres S 523", p.a. B. Bultemeijer, Jan v. Galenstraat 86[1], Amsterdam.

Atentu! Atentu! Baldaŭ aperos kalendareto. La prezo estos po 10 cendoj. Eksterlandanoj jam nun povas mendi kaj pagi per respondkupono. Perantoj rapidu, ĉar baldaŭ finiĝos la jaro kaj tiam oni bezonos ĝin! Mendu por viaj sekcianoj!

LA 21a ESTU EKSTERORDINARA!!

NUN

estas la ĝusta tempo por aliĝi al S.A.T.

Voor onze Conversatieavonden.

Enige tijd geleden is er te Bergen op Zoom door enkele actieve esperantisten een Esperanto Filmgroep opgericht. Deze stelt zich ten doel filmstroken met de bijbehorende esperanto-teksten uit te geven over diverse interessante onderwerpen, waarmee de conversatie-avonden belangrijk aantrekkelijker kunnen worden gemaakt. De filmstroken zijn van normaal formaat, dat is 18 x 24 mm. en kunnen in elk lichtbeeldapparaat gebruikt worden.

De eerste drie stroken zijn al verschenen en behandelen de volgende onderwerpen:

Door oud Griekenland. 58 filmbeelden met tekst f 6.85.

Land en volk van Siam. 54 filmbeelden met tekst f 6.25.

Tussen de Arabieren in Arabië. 39 filmbeelden met tekst f 5.25.

De tekstboekjes zijn ook afzonderlijk verkrijgbaar, maar de filmstroken worden alleen met de daarbij behorende teksten afgeleverd. Er zijn nog andere beelden in voorbereiding waaronder:
Met Sven Hedin naar de Himalaja. — Een zeereis naar Indonesië. — Lappen en Finnen. — Meksiko. — Palestina (in twee delen).

Er wordt dikwijls geklaagd dat de conversatie-avonden niet aantrekkelijk genoeg zijn, om de leden voortdurend tot bezoek te brengen. Het houden van lezingen met lichtbeelden, die het gesproken woord illustreren, kan een middel zijn tot verhoogd bezoek, waarom wij het bij onze afdelingen kunnen aanbevelen. Bestellingen en betalingen aan Libro-Servo F.L.E., Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

PROTESTO DE INFANO.

En „Denaska Esperantistaro", la organo de la societo de denaskaj esperantistoj, ni legas la jenon:

Infana malaprobo de denaskulo, kies sola lingvo estas Esperanto.

En 1937a okazis en Zagreb Esperanto-kongreso, kiun ĉeestis proksimume 700 personoj. Mia edzino kaj mi ĉeestis, kunpreninte ankaŭ la malgrandulon. La stacidomo de Zagreb estis jam plena de samideanoj, kiuj, aŭdante infanon paroli Esperanton (ĉar li ĉiam ĉion demandadis,) ekadmiris kaj entuziasmiĝis tiom, ke ni ne povis liberiĝi de ili.... Dum malfermo de la kongreso salutvorton parolis iu samideano en nacia lingvo, kaj dum granda silento leviĝis nia heroo (li estis 20-monata) dirante kiel eble plej laŭte:

„Paĉjo, kion palolas tiu homo? Mi komplenas nenion; ni ilu hejmen!"

Kvazaŭ bombo tiuj vortoj frapis la aŭskultantaron; estiĝis granda entuziasmo kaj oni povis daŭrigi la kongreson nur post 15-minuta granda bruo!"

DANKO KAJ ADIAŬO.

Al ĉiuj gekamaradoj kun kiuj mi pasigis neforgeseblajn momentojn dum mia rondvojaĝo en Nederlando, mi sendas amikajn salutojn.

Mi dankas ĉiujn miajn gastigintojn por la afableco kaj amikeco, por la donacoj kaj ĉio alia. Mi neniun el vi forgesos; mi esperas, ke vi — se eble ĉiuj — estos baldaŭ ankaŭ miaj gastoj. Mi dankas al ĉiuj ĉeestantoj de miaj paroladoj kaj muzikvesperoj pro iliaj kompreno kaj interesiĝo, kiuj treege plezurigis min.

Mi diras al vi, ke ĉiuj ĉeĥoj admiras la nederlandanojn pro iliaj energio kaj laboremo. Viaj verkoj ŝajnas al mi veraj mirakloj. Mi baldaŭ rakontos en mia lando pri ĉiuj miaj spertoj. Estu certaj, ke mi havas nur bonajn memorajojn.

Gekamaradoj! Mi deziras, ke vi konservu simpation por miaj lando kaj popolo. Ni ambaŭ — nederlandanoj kaj ĉeĥoj — scias bone, kion signifas libereco — ĉar ni spertis ambaŭ malhelajn tagojn de sklaveco. Ni komprenas unu la alian. La malfeliĉaj jaroj forpasis, sed ili certe alproksimigis najn popolojn.

Ni estu amikoj por ĉiam. Mi mem tute ne sentis inter vi, ke mi estas en fremda lando. Mi estis hejme en Esperantujo! Mi havis impreson esti inter parencoj!

Akceptu nun mian dankon. Mi forte deziras, ke mi povu repagi al vi ĉiuj miajn grandajn ŝuldojn; tio povos okazi, se vi baldaŭ vizitos mian landon. Ni, ĉeĥaj esperantistoj, akceptos vin kun gefrataj amo kaj ĝojo.

Marie Havránková, Prestejow. Ĉeĥoslovakio.

RECENZO

Novaj Esperanto-Historietoj, verkitaj de L. Friis kaj aliaj. Eldonis: Dansk Esperanto-Forlag.
Ĉi tiu verketo celas doni facilan kaj simplan legaĵon al la komencanta esperantisto. Ni opinias, ke la aŭtoroj efektive atingis sian celon, ĉar iliaj historietoj formas vere preskaŭ neriproĉeblan materialon por prepari la novulon por la granda literaturo de Esperanto. La stilo estas simpla kaj flua kaj mankas gramatikaj eraroj. Kritikinda ŝajnas al ni nur la uzo de naciformaj nomoj kiam ili posedas nenian utilon por la rakonto.
En la dua historieto ni renkontis la formon „oero", dana monunuo. Ĉi tie ni preferus „speso" aŭ la pli internacia „cendo".
Koncerne la enhavon mem ni ankoraŭ volas laŭdi la aŭtorojn pro la freŝeco de la anekdotoj. Tro ofte ni ja renkontas en tiaj verkoj tro gurditajn temojn. Fine ni menciu, ke la Literatura Komitato de F.L.E. kontrolis la libron. W.F.K.

ESPERANTA KRESTOMATIO

ONMISBAAR VOOR HET A-EXAMEN f 1.75

★

Sluitzegels „Esperanto 60-jara" p. 100 st. **f 0.75**

ATESTO.

Subskribintoj, alvenintaj je la invito de la estraro de „Antaŭen" okaze de la 35 jara jubileo de la Zaandama Esperanto Unuiĝo „Antaŭen" atestas, ke la verda semajno, aranĝita inter la 13a de septembro kaj la 21a de septembro 1947, fariĝis vera internacia amika kunveno de plej diversaj nacioj.

La Unuiĝo „Antaŭen" pruvis, ke ĝi kapablis eminente krei varman sferon, organizi, propagandi kaj pruvi kamaradecan gastamon. Subskribintoj estas ravitaj pri la travivaĵoj de la verda semajno. Ili esprimas sinceran ĝojon, ke ili povis ĉeesti kaj pro tio ili multe dankas al la unuiĝo „Antaŭen". Vivu Zaandama Esperanto Unuiĝo, vivu la internacia kunlaboro de la popoloj!

Zaandamo, la 20an de septembro 1947.

Einar Adamson kun edzino, Göteborg, Svedio. — Kent Alexander kun edzino, New Malden Surrey, Anglio. — Berceli Béla, Budapest, Hongario. — T. H. Cox kun edzino kaj filino, Reading, Anglio. — Stefano Csurgai, Budapest, Hongario. — Th. van Gindertaelen kun edzino, Mechelen, Belgio. — Maria Havránková, Prostějov, Ĉeĥoslovakio. — C. Hilmer Johanson, Ĉefredaktoro, Linköping, Svedio. — Richard Levin, Lyon, Francio. — W. J. Nesbitt, Whitby, Yorkshire, Anglio. — Richard G. Nielsen, Redaktoro, Herlufmagle, Danlando. — Jorgen Rosendahl, Oslo, Norvegio. — Mason Stuttard kun edzino, Amersham, Anglio. — Emil Vokal kun edzino kaj filino, Vieno, Aŭstrio. — Madeleine De Cock, Gent, Belgio. — R. Curnelle, Lille Frakrijk, Gent, Belgio. — D. Metz, Lyon, Francio. — Jean Bosland, Villeurbanne Rhône, Francio. — Max Mendlewicz, Lens, Francio. — Maurice Manent, Romans-Drôme, Francio.

Aldone al supre staranta atesto ni nepre per nia L.E. publike volas esprimi nian dankon por la kunlaboro kiun ni de ĉiuj ricevis por sukcesigi nian „Internacian Semajnon Zaandaman". Ĉu ni estas en la plej malgranda domareto kiel ekzemple en Lutjewinkel, ĉu ni estis en unu el la plej grandaj urboj, kiel ekzemple Rotterdam, ĉie ni trovis la ĝustan komprenon por kunlabori kun ni.

Dum ĉiuj kunestoj, kie ajn, ni trovis la veran kamaradecan sferon, kiun ni tiom arde bezonas. Ke tio restu, estas la deziro de la estraro de Zaandam-Antaŭen.

Esperantisten-natuurvrienden op Reutsperre

Te midden der hoge bergen van het Ober Haslital ligt het Zwitserse Natuurvriendenhuis „Reutsperre". Van 1—10 Augustus j.l. waren hier (uitgenodigd door T.J.O.) een 55 Esperantisten-Natuurvrienden uit 10 verschillende landen bijeen. Behalve heerlijke bergtochten op de dag waren er 's avonds de besprekingen over verschillende onderwerpen. Dat wij Esperantisten elkander begrepen, ondanks het feit der verschillende nationaliteiten, was voor ons geen wonder, maar de aanwezigen — niet-Esperantisten — leek het wel heel vreemd. En ze gaven daar duidelijk blijk van!

Maar voor ons was het nog belangrijker dat hier tot uiting kwam hoe prachtig onze Esperanto-beweging en het Natuurvriendenwerk op elkander ingesteld zijn!

De eenvoudige gezonde sfeer van de Natuurvriendenhuizen, vraagt als het ware om gebruikt en benut te worden door ons Esperantisten.

En daarom hebben wij in Reutsperre afgesproken met nog meer kracht te gaan werken voor het gebruik van Esperanto in de Natuurvrienden organisaties, voor het gebruiken van de mogelijkheden der natuurvriendenhuizen in de Esperanto-beweging.

Naturamikaj-Esperantistoj, jen bona kaj bela tasko! A. Reuderink.

29a Kongreso de F.L.E. en Amersfoort!!

Komunikoj de la O.K.K.

Sekretario P. Poort-Procee, Vermeerstraat 16.
Kasisto J. van 't Hul, Soesterweg 457.



Pasko la 48a alproksimiĝas. La O.K.K. por prepari nian 29an kongreson eklaboris. Ĝi sukcesis akiri la plej grandan salonon en Amersfoort — nome „de Markthal" — por ĉi tiu okazintaĵo, kiu devas fariĝi la plej granda en Amersfoort. Eksterstarantoj jam demandis al ni, ĉu ni estas frenezaj, okazigi ion tian en Amersfoort. Ni nur ridetas kaj iras nian vojon. Sed vi zorgu, ke tuta Amersfoort verdiĝu en tiuj tagoj.

Ni jam havas hotelojn, amasloĝejon kaj parton de la junulargastejo.

La interkonatiĝvespero certe fariĝos vera interkonatiĝvespero, kun speciala sfero.

Ni esperas organizi komunan manĝadon, kiu verŝajne estos la ununura kiu okazos.

Sed sen via helpo okazos nenio. Do ŝparu por viziti la 29an kaj atentu niajn sekvontajn komunikojn. O.K.K.

PRELEGA SERVO F.L.E.

La rondvojaĝo de Marie Havránková.

La unua rondvojaĝo finiĝis kaj ni povas esti kontentaj pri la rezultato. K-ino Havránková paroladis en 20 sekcioj de nia asocio kaj vojaĝis tra la tuta lando. Al ĉiuj petintoj ŝi povis iri kie ajn ili loĝas en la lando. Tiun ĉi profiton oni povas ĝui nur kiam tia vojaĝo estas organizita grandskale.

Laŭdon por ĉiuj, kiuj tiom bonege komprenis kiel oni devas sukcesigi rondvojaĝon! La afero tiom glate funkciis, ke la prelegantino nur povis esprimi dankvortojn por ĉiu ajn helpado. Ŝi ĝuis multon kaj intencas fari en sia lando prelegojn pri Nederlando kaj certe uzos viajn sugestojn kaj informojn. Tiel la prelegoj havis du gravajn profitojn: unue eduki nian membraron kaj due doni al la prelegantino bonan superregardon pri niaj lando, vivo, moroj kaj folkloro.

Multaj sekcioj sendis raportetojn kaj ĉie ni povis konstati kiom ĝojaj ili estas pri la sukceso. Ni donu al kelkaj la parolon, por ke la leganto havu klaran impreson pri tiu ĉi vojaĝo:

Wormer: La prelegantino havigis al ni lernigan vesperon per siaj bildoj pri Ĉeĥoslovakio kaj per sia belega pianludado.

Schagen: Ĉeestis Esperantistoj, kiuj venis el preskaŭ la tuta norda parto de nia provinco: den Helder, Breezand, Lutjewinkel, Nieuwe Niedorp, Heer Hugowaard, Langedijk, Kolhorn, Winkel, 't Zand, Koedijk. Estis multe da interesiĝo por ĉi tiu kunveno. Ni ĝuis agrablan vesperon kaj esperas, ke estontece povos okazi pli da tiaj vesperoj.

Beverwijk: Ni aŭdis nian karan lingvon parolata de eksterlandanino, kiu ne scipovas la nederlandan; ĉiuj devis vole ne vole paroli Esperanton. Granda sukceso por nia sekcio kaj por la prelegantino. Tiaj vesperoj petas ripeton!

Eindhoven: La prelego okazis en kunlaboro bonharmonia kun la katolika kaj kristana sekcioj. Ni akiris impreson de bela lando kaj fervora popolo. Emo vekiĝis por vidi ĉi ĉion kaj vojaĝi al tiu lando, se tio finance kaj devize estus ebla.

Leeuwarden: Ni estas plene kontentaj pri la programo kaj la prelegantino. Tro malofte ni vidas tiajn samideanojn en la nordo. Ili povas multe kontribui al la klerigado de nia membraro kaj ni esperas, ke la asocia estraro daŭrigos laŭ tiu vojo.

Rotterdam 2: Majstre S-ino Havránková pianludadis ĉeĥoslovakian muzikon kaj rakontis pri la diversaj komponistoj. Ni travivis tre agrablan vesperon artan. Ĉio postlasis ĉe niaj aŭskultantoj tre bonan impreson!

Amsterdam 5: Multaj eksterlandanoj, jam vizitis nian sekcion. La arton, kiun ni ĝuis kun Maria Havránková ni ne baldaŭ forgesos. Ŝi lasis al ni agrablajn pensojn pri belaj momentoj en nia vivo, kiujn ni povis plene ĝui nur per Esperanto. P. G. van der Plank.

LAAT ONS NUCHTER BLIJVEN

Naar aanleiding van een radio-praatje door de heer K. Voskuil, hoofdredacteur van „Het Vrije Volk" over zijn bezoek aan de 10e Internationale Rode Nederzetting vroeg een luisteraar in H.V.V. van 6 September, hoe men zich daar met zoveel nationaliteiten kon verstaanbaar maken en of het niet mogelijk zou zijn, dat wij arbeiders de propaganda voor Esperanto intensiever dan tot nu toe, ter hand namen.

De heer Voskuil antwoordde hierop:

Een gemakkelijk te leren hulptaal als het Esperanto kan juist voor arbeiders van onschatbare waarde zijn in het verkeer met arbeiders van andere landen.


Ik geef dus graag deze luisteraar de gelegenheid een propagandistisch woordje te schrijven.

Maar op de Paasheuvel ging het ook zonder Esperanto best. Vriendschap is een woord, dat de jeugd gemakkelijk begrijpt, in welke taal het ook wordt uitgesproken!

Inderdaad kan het Esperanto voor arbeiders van onschatbare waarde zijn en voor ons arbeiders-esperantisten is het dit ook. Maar.... *juist* voor arbeiders? Wij zeggen: *niet alleen* voor arbeiders. Men leze b.v. maar eens de brochure *Esperanto en de Wetenschap.* Maar dit is een onderwerp, waar we later wel eens op terug zullen komen. Waarop we nu de vinger willen leggen, is de bewering, dat het daar op de Paasheuvel ook zonder Esperanto best ging. 't Is maar, wat voor eisen men aan de conversatie stelt: als die eisen niet hoger zijn dan zoals de tekenaar Ger Sligte in Het Vrije Volk de conversatie op de Paasheuvel uitbeeldt, dan zijn wij, esperantisten daar beslist niet mee tevreden!

En nu kome men bij ons niet aan boord met „Vriendschap is een woord, dat de jeugd gemakkelijk begrijpt, in welke taal het ook wordt uitgesproken!" Dit is niet meer dan een phrase, waarmee men zich van de zaak tracht af te maken. Ze klinkt goed en wij twijfelen niet, of ze zal bij velen ingeslagen zijn, als zelfs een hoofdbestuurder van de A.J.C. het een prachtig antwoord vindt.

Laat ons nuchter blijven. „De wereld



zoals de tekenaar het zag

omspannen met vriendschap" is ook het streven van ons esperantisten. Maar daarbij laten wij ons niet van de wijs brengen door orakeltaal. Als vriendschap wil zijn wat ze *moet* zijn, dan is de eerste vereiste, dat men met elkander kan praten, praten over alles wat onze geest bezig houdt: over ons lief en ons leed, over onze idealen en onze strijd; dat men kan discussiëren over de vragen van de dag en ook een eventuele onenigheid met elkaar kan uitvechten.

Aan deze eisen wordt volkomen voldaan door het Esperanto. Daarvan kunnen o.a. de deelnemers aan het 20e Internationale congres van de Wereldbond van Arbeiders-Esperantisten getuigen, dat in Augustus j.l. te Aarhus (Denemarken) werd gehouden. Daar kwam de vriendschap eerst goed tot haar recht, doordat niemand enige last ondervond van het taalverschil.

Wie zich daarvan met eigen oren wil overtuigen, brenge een bezoek aan het 21e Congres van bovengenoemde bond, dat in 1948 wordt gehouden in Amsterdam.

RECENZOJ

Arboj de la arbaro kaj kampo de Frank Booth, kun ilustrajoj de Edith R. Turlington. Eld. The Esperanto Publishing Co. Ltd. Anglujo. Prezo 1 ŝ. 9 p.

Naturamantoj certe trovos plaĉon en ĉi tiu verketo, kiu traktas pri la frakseno, la platano, la acero, la fago, la karpeno, la ulmo kaj la kverko. Bildoj pri tiuj arboj en ilia vintra kaj somera aspektoj klarigas la tekston.

Vivo arto de Goya de Agostinho da Silva, el la portugala tradukis Virgilio Mendis. 20 p. Portugala Eldona rondo. Prezo f 0.35.

La verketojn el la serio „Enkonduko en la kulturon" ni povas varme rekomendi al niaj anoj. Ili prezentas bonan materialon por fari prelegojn pri diversaj temoj.

Vivo kaj arto de Goja estas ilustrita per kelkaj bildoj pri verkoj de la fama hispana pentristo.

Kontrolita de la Literatura Komitato F.L.E.



LA NEVENKEBLA ĜENO

Momentoj de tualeta mizero
de Theo Thijssen
Tradukita de F. Faulhaber.
Ilustrajoj de Bach Schuurmans.

Tre taŭga por voĉlegado en grupaj vesperoj. 320 paĝoj.

Prezo (bind.) .... f 4.90

Van het

F.L.E.-AmikaroFront

Er zijn weer een paar berichtjes binnen gekomen, maar dit kan ik wel zeggen, als jullie niet allemaal als de gesmeerde bliksem op sjouw gaan, dan wordt het gestelde doel niet bereikt.

Bedenkt wel vrienden, wanneer we volgend jaar bij de overheid en bij de arbeidersbeweging iets willen bereiken voor het S.A.T. Congres, dat we dan met cijfers moeten kunnen komen.

Voor een Congres in Amsterdam, waar volgend jaar wel tien of twaalf congressen plaats vinden, moet je kunnen imponeren. Laat ons dan zorgen, dat we er zijn.

Het Bureau Esperanto bij het Onderwijs heeft zich tot de leden van de Tweede Kamer gewend. Deze dames en heren zullen belangstelling voor onze zaak hebben, als zij weten, dat onze eis „Esperanto in de School", door een belangrijk deel van het Nederlandse volk gedragen wordt.

In al deze dingen ligt de betekenis van onze F.L.E.-Amikaro, wat eerlijk gezegd, nog maar enkelen door hebben. Hier zijn er een paar: Rotterdam 6, in totaal geworven 1333 Amikoj, waarbij k-do A. van Es aan de kop gaat met 527 stuks. Zelfs k-do Stierman heeft nog kans gezien er 217 te noteren. En laat ons nou niet denken, dat de aanmeldingen bij deze k-doj zo maarvanzelf zijn komen binnenwaaien, om de bliksem niet, daar moest voor gewerkt worden, daar was begrip voor nodig en geloof. Ik wil deze afdeling geen cent te kort doen. En wat te zeggen van het volgende: Enige weken geleden was ik in Winterswijk en vroeg terloops hoe het met F.L.E. Amikaro stond. En daar werd me even uit de doeken gedaan, dat ze daar in een afdeling van misschien 8 of 10 leden kans hadden gezien 430 Amikoj te winnen, waarvan k-dinoj Lammers en Ten Pas er respectievelijk 25 en 204 voor hun rekening hebben genomen.

En als je dan hoort, dat deze beide k-dinoj er elke week een middag met z'n beiden op uittrekken en in zo'n geisoleerde afdeling ons ideaal hoog houden, dan wil ik wel even openlijk getuigen, dat ik daar het diepste respect voor heb.

Ook Schagen heeft er ondanks meningsverschillen nog een schepje op gegooid en tippelt al aardig naar de 200.

Ook de berichten uit Zaandam zijn veelbelovend, waarmee ik maar zeggen wil: wat de één lukt kunnen we allemaal proberen.

Laten we dus even afspreken, dat we er allemaal nog even een schepje op gooien, opdat ondergetekende tenslotte toch nog ongelijk krijgt.

Tot de volgende keer. *v. H. R. N.*

 MEDEDELINGEN BONDSBESTUUR

Radio. In onze uitzending van 6 Dec. a.s. wordt medewerking verleend door „La Verda Kabaredo" uit Amsterdam.
Zaterdag 3 Januari 1948 spreekt de heer P. W. Baas over „Esperanto bij het onderwijs".
De uitzendingen vinden plaats ongeveer om 4 uur.
Interkontaktilo werd Woensdag 29 October aan alle afdelingen en districten toegezonden.
Administratie en Libro-Servo: Wij maken er onze afdelingen, districten en leden op attent, geen bestellingen te doen door midel van de girostrookjes en verzoeken tevens het doen van persoonlijke mededelingen e.d. op deze strookjes achterwege te laten.
Redactie L.E. Door gebrek aan plaatsruimte moesten vele artikelen tot een volgend nummer blijven liggen. Fotocliché's kunnen we vanwege de hoge kosten niet laten maken. Districts- en afdelings-mededelingen dienen zo beknopt mogelijk te zijn, liefst in telegramstijl. Copie dient vóór de 25e van elke maand in ons bezit te zijn.

Grava perdo.
Tio, kion ni klopodis eviti, tamen okazis: k-do Alings forlasis pro la malbona stato de sia sano la Asocian Estraron. Estontece ni do malhavos liajn bone pripensitajn avizojn. Ni kore dankas lin pro liaj multaj laboroj. Feliĉe li ne plene perdiĝis: vi tamen povos de tempo al tempo trovi liajn kontribuajojn en L.E. kun subskribo H.W.A.
En la nomo de vi ĉiuj ni deziras al li baldaŭan kaj plenan resaniĝon.

 EL LA DISTRIKTOJ

AMSTERDAM
Sekr.: Pieter Aertszstraat 83hs
La distr. amsterdama organizas B.- kaj funkciulan kurson sub ĝenerala gvidado de k-do G. Degenkamp. La lecionoj okazos la unuajn kaj triajn dimanĉojn de ĉiu monato ek de novembro ĝis la 18a de aprilo 1948.
La kurso entute kostas f 5.— (kvin guldenojn)
La partoprenontoj havigu al si:
Tra labirinto, Gvidilo, Wat de A-candidaat.... Leidraad, Esperanto 60-jara kaj la 3an jarkolekton de L.P.
Pro la fakto ke la unua leciono jam komenciĝis, la eventualaj partoprenontoj, kiuj certe ankoraŭ povas partopreni, rekte iru al la konstruaĵo „de Leeuw", Valkenburgerstr. 149.
Al malgranda nombro da F.L.E. anoj ekster A'damo (ekz. Gooi, Haarlem, Zaanregiono, k.t.p. ni konsentis ke ili partoprenu eĉ senpage.
Vi ne plu timu ke via sekcio ne havas kursgvidanton. Kaptu nun la okazon spertiĝi ilin per ĉi tiu B-kurso. De studanto al kursgvidanto!
Granda Zamenhoffesto kun balo okazos la 20an de decembro 1947a, en la konstruaĵo „de Leeuw", Valkenburgerstraat 149.
Pliaj detaloj en la decembra distr.: bulteno kaj en L.E. Mendu frue viajn enirkartojn.
G. J. Burgman.

ROTTERDAM
Sekr.: Lange Geer 28
La 31an de aŭgusto, la „Roterdama Distrikto" aranĝis ekskurson per ŝipo al Krimpen.
Ni forveturis je la 10a matene; sur la ŝipo regis agrabla etoso; du grandaj Esperantoflagoj flirtis de la ferdeko.
La esperantistoj de la sep roterdamaj sekcioj kaj ankaŭ gek-doj el Delft kaj Schiedam havis la okazon kontaktiĝi.
Kiam la ŝipo alvenis en Krimpen, ni jam tuj rimarkis la flirtantan flagon de sekcio Krimpen. Gek-doj el Krimpen, Lekkerkerk, Capelle a. d. IJssel kaj Sliedrecht salutis nin. Tuj post la alveno en Krimpen, ni dividis la ĉeestantojn en du grupojn. Unu grupo iris al la naturbanejo kaj la dua grupo vizitis intertempe la akvoturon.
Partoprenis al ĉi tiu ekskurso proksimume 150 gek-doj ekster la infanoj, kiuj ankaŭ ĝuis kaj ludis en la tiea ludgardeno.
Ĉi tiu ekskurso certe estis la lasta de ĉi tiu belega somero. Kaj nun gek-doj ek al la laboro.
La estraro ankoraŭ dankas al ĉiuj, kiuj helpis agrabligi ĉi tiun neforgeseblan tagon, precipe al la kamaradoj, kiuj montris kaj rakontis ĉion pri la akvoturo. Tiu rondirado estis tre lerniga.

ATENTU! Liberigu vin por la Zamenhofa vespero lundon la 15an de decembro en la kantino de „Stadstimmerhuis", Veemarkt. Enirprezo f 0.50.

 JU-KO 

Het zal jullie bekend zijn, dat het 21e S.A.T.-congres in Amsterdam zal worden gehouden, waarschijnlijk gedurende de eerste week van Augustus. Oppervlakkig bezien is deze gebeurtenis nog ver in het verschiet en zijn plannen nog wat erg voorbarig. Wij moeten echter bedenken, dat zo'n belangrijke bijeenkomst vele voorbereidingen noodzakelijk maakt en dat het voor een goede organisatie niet wenselijk is op het laatste ogenblik met plannen en voorstellen voor de dag te komen.
Zij, die met aandacht de rapporten over het S.A.T.-congres te Aarhus hebben gelezen, zullen geconstateerd hebben, dat de jeugdfractie in S.A.T. tot activiteit is gekomen. In enkele landen, o.a. ook in ons land, zijn „perantoj" gekozen, welke tot taak hebben contact te zoeken en te onderhouden met buitenlandse jeugdorganisaties. Het ligt voor de hand, dat ook van het S.A.T.-congres, dat te Amsterdam zal worden gehouden, een deel gewijd zal zijn aan een vergadering van de internationale esperanto-jeugd. Vele jonge esperantisten zullen dan bijeenkomen om van gedachten te wisselen over het internationale jeugdwerk.
Het bestuur van JU-KO is reeds nu aan het werk gegaan om deze bijeenkomst voor te bereiden en heeft o.a. het plan opgevat een week voor het congres een internationale jeugdweek te organiseren, waarin aan de buitenlandse vrienden de gelegenheid zal worden geboden eens kennis te maken met ons land. Wij denken bijvoorbeeld aan een trektocht door Nederland langs onze jeugdherbergen. Het behoeft geen betoog, dat dit plan alleen enige kans van slagen kan hebben, als wij kunnen rekenen op de volle medewerking van onze leden.
In de eerste plaats zullen enige tientallen buitenlanders moeten worden ondergebracht bij geestverwanten. Het verblijf van onze gasten gedurende deze week moet met zo weinig mogelijk kosten gepaard gaan en dit kunnen wij slechts bereiken indien een groot aantal van onze leden bereid is één of meer buitenlandse gasten te ontvangen.
Daar het voor een goede organisatie van deze internationale bijeenkomst noodzakelijk is, dat wij reeds zeer vroeg een overzicht hebben van onze mogelijkheden, verzoeken wij allen die hiertoe gelegenheid hebben, ons te willen mededelen hoeveel buitenlanders zij kunnen ontvangen.
Verder zullen wij gaarne voorstellen ontvangen voor het programma van onze internationale jeugdweek.
Vrienden, de tijd gaat snel. Voordat we ons dit bewust zijn is het Augustus en dan moeten we klaar zijn.
Onze eerste internationale bijeenkomst moet slagen!

 EL LA SEKCIOJ

AALSMEER „Ĉiam supren"
Sekr.: Seringenstraat 6
Denove venas vivsigno el Aalsmeer. Post la malsukcesa klopodo funkciigi nian sekcion en la aŭtuno de la pasinta jaro, ni nun klopodis revivigi nian movadon kun helpo de aktiva k-do J. de Roest, kiu transloĝis de Zuilen al Aalsmeer. En la kunveno de la 23a de septembro aliĝis 8 anoj kaj ni elektis novan estraron: Prez.: k-do J. de Roest; sekr. k-do H. A. Hoogervorst; kas.: k-dino J. Hofman-Spaargaren. La 8an de oktobro komenciĝis kurso kun malmultaj partoprenantoj, sed kun humora energio. La Sekretario.

AMERSFOORT
De la 6a ĝis la 11a de oktobro okazis en „de Markthal" en Amersfoort, granda ekspozicio, organizita de la Federacio de Laboristaj Unuiĝoj. Ĝin organizis do la laboristoj kaj ĉefe por montri unu al la alia, kion ili produktas.
Car nia sekcio estas membro de nomita Federacio en la fako „klerigado" ankaŭ ni havis la okazon ekspozicii.
Oni donis al ni la plej belan lokon de la tuta halo kaj ni montris dum semajno, kio estas Esperanto kaj kiel ĝi progresas.
Vizitis la ekspozicion pli ol 11.000 homoj, el kiuj certe la duono serioze pririgardis nian standon kaj per siaj demandoj montris sian interesiĝon aŭ nescion.
La rezulto estis, ke ni enskribis 43 kursanojn kaj krome kelkajn por L.E.E.N. kaj la Katolika sekcio.
Nia ekspozicio estis granda sukceso kaj de ĉi tiu loko la estraro kore dankas ĉiujn, kiuj kunlaboris al ĝia efektiviĝo.
P. Poort-Procee.

AMSTERDAM XI
„La Insuloj"
De 13a—28a de septembro nia sekcio organizis sukcesplenan ekspozicion. Ni dankas tion al la fervora kunlaboro de niaj anoj, kiuj tuj estis pretaj doni sian liberan tempon. Dankon ankaŭ al la familio Griffioen por la multa bono, kiun ĝi faris dum la ekspozicio. Bedaŭrinde trafis tiun familion grava bato pro la perdiĝo de ilia tre amata infano dum tiu semajno. Ni esperas, ke la familio trovos forton por porti ĉi tiun malfeliĉon. Komprenebl ni ne povis ekspozicii dum tiu semajno, sed faris tion de 27a de sept. ĝis 5a de okt. Ni enskribis 38 kursanojn, kiujn instruos k-do J. de Groot.
Gekamaradoj, sekcio 11a iras ĉiam antaŭen!
W. Boshuis, prop. gvid.

ANTWERPEN — DEURNE
Ni faris dum la verda monato grandskalan propagandon. Komenciĝis Esperanto-kurso en la poŝtoficejo, nur por poŝtistoj de Antwerpen kaj ĉirkaŭaĵo. Sabaton la 27an de septembro okazis malgranda mitulfesto en nia salono por la esperantistoj kaj iliaj familioj el A. kaj ĉirkaŭaĵoj. Ĉeestis proks. 50 personoj. Ĝi daŭris ĝis noktmezo. La ĉeestantoj pasigis agrablan vesperon. Vendredon la 30an de septembro komenciĝis nova kurso en nia salono. — Sekcio „Antaŭen" finis la verda monato sukcesplene.

APELDOORN
Sekr.: Bloemheuvellaan 46

Nia septembro-propagando bone sukcesis. Ni luis budon sur la vendeja placo kaj montris nian diversan materialon. La 17an de oktobro komenciĝis nia elementa kurso kun proks. 20 gelernantoj. Ĝi okazas en lerneja ĉambro. Ni esperu, ke ili fariĝu bonaj F.L.A.-anoj. — Kaj nun, gekamaradoj, ni montru, ke ankaŭ en Apeldoorn loĝas multaj F.L.E.-amikoj! Ni do laboru! — En septembro ni rememoris du jubileojn, nome de k-doj Bredenoord kaj Bakker, kiuj festis resp. sian 40-jaran kaj 25-jaran edzecojn.

La venontan jaron okazos en Apeldoorn granda flor-ekspozicio. Al V.V.V. ni jam anoncis la adreson de nia sekretariino, petante, ke ĝi uzu en siaj propagandiloj ankaŭ Esperanton, precipe pro tio, ke multaj eksterlandanoj vizitos nian landon okaze de la S.A.T.-kongreso. Ĝi promesis plenumi nian peton. Jen, bona propagando!

M. Woestenenk-Schiphorst.

SEKCIO ARNHEM „Fidu la estonton"
Sekr.: Sleedoornlaan 31 Arnhem

Dum la verda monato ni organizis 3 ekspoziciojn dum 3 sinsekvaj sabatoj en diversaj kvartaloj. En la loka gazetaro aperis anoncoj kaj prop. artikoletoj. Ni disdonis 5.000 flugfoliojn kaj sendis instigajn leterojn al la sindikatoj. Rezulto: 23 kursanoj, inter kiuj 3 por la asocia skriba kurso. Krome ni organizas por niaj anoj daŭrigan kaj A-kursojn. Niaj konversaciaj vesperoj okazas regule jaŭdvespere en „Opbouw", Velperweg. Antaŭ la paŭzo ni pritraktas gramatikajojn, post la paŭzo okazos enkondukoj pri diversaj temoj. En kunlaboro kun la sekcio de L.E.E.N. ni aranĝis prelegvesperon en kiu parolis s-ino Havránková el Ĉeĥoslovakio pri sia lando, popolarto kaj muziko. Interesa vespero. La sekcio de L.E.E.N. organizis en kunlaboro kun nia sekcio prelegon de ges. Nielsen el Danio la 25an de oktobro pri „La poezio de la jaro" kun lumbildoj kaj deklamado. P.R. sekr.

BEVERWIJK „FRATECO"
Sekr. W. Kamlag, C. Matersweg 13.

La 20an kaj 21an de septembro okazis Esp. ekspozicio en Beverwijk. Pro tio, ke nia sekcio ekzistas 25 jarojn, ĝi devis esti ĉi foje pli sukcesa ol la antaŭaj, malgraŭ la pli altaj kostoj. Ĝi estis modela ekspozicio, al kiu kunlaboris multaj anoj sub gvido de nia pioniro Jacob van Wijngaarden, kiu samokaze festis sian 25-jaran jubileon kiel esperantisto. Sen lia iniciato kaj fervoro ĝi ne estus sukcesinta. Eĉ nokte li laboris por pretigi ĝian materialon. Ĉu ni sukcesis? Mi kredas, ke jes, ĉar la estraro de la N.H. distrikto transprenis ĝin por ĝin uzi aliaj sekcioj kaj en tiuj lokoj kie sekcio ne ekzistas. — Ĉeestis proks. 30 personoj, i.a. kelkaj komunumaj konsilantoj de la Partio de la Laboro, de la Komunista kaj de la Kristana partioj, la rektoro de la R.K. seminario kaj reprezentantoj de la du lokaj gazetoj. — Per mallonga parolado la prezidanto malfermis la ekspozicion, post kio la ĉeestantoj rigardis ĝin. — Post la rondiro paroladis la reprezentantoj de la Partio de la Laboro kaj de la Komunista Partio, kiuj promesis subteni nian petskribon por enkonduki Esp. en la lernejon. Ili promesis ankaŭ, ke ili sendos petskribon similan al la nia en la nomo de siaj resp. partioj al la Inspektoro de Instruado en Alkmaar. Vizitis la ekspozicion 700 personoj. Ni enskribis 50 kursanojn.

BRUNSSUM
Sekr.: C. Janknegt, Vossenstraat 7

Korekto de la informo en la antaŭa numero: Prez. k-do Kasius; sekr. k-do Janknegt; kasisto: k-do Koning; 2a sekr.: k-do Agricola; 2a kasisto: k-do Kamphuis.
Ni jam gajnis 60 F.L.E.-amikojn kaj 24 kursanojn.

BUSSUM
Sekr.: Irisstraat 16

Je la 27a kaj 28a de septembro nia sekcio aranĝis propagandan Esperanto-ekspozicion. La vizitado estis ne malkonsentiga, kaj la rezultato ankaŭ ne. Dudek personoj partoprenos nian novan kurson.
La jarkunveno okazis la 3an de octobro. Nia sekcio intencas fari multe da propagando dum la venonta jaro.
La nuna estraro konsistas el: k-do G. Vrees, prezidanto, k-do A. van Dieren, sekretario, k-do H. A. Burgerhout, kasisto kaj k-do H. van Ouwerkerk, bibliotekisto.

HOENSBROEK „Unueco"
Sekr.: Spoorstraat 9, Nuth

La 11an de oktobro nia grupo, en kunlaboro kun sekcio Brunssum, organizis propagan-vesperon en la granda salono de „Protestants Jeugdhuis" en Treebeek.
Je la 7.30 k-do A. Kok malfermis la kunvenon kaj donis la parolon al k-do C. v. Bree, kiu en eminenta parolado klarigis la utilon de esperanto en la praktiko. La nova teatra klubo „Zamenhof" prezentis la komedion „Vader kent z'n Frans", kiu tre plaĉis al la ĉeestantoj. La muzikan parton de la vespero prizorgis la mandolin-klubo „De cresendo's". Spontaneaj aplaŭdoj estis la rekompenco por la penadoj de la kunlaborantoj, kiuj ofte superis sin mem.
Je la 11a horo, tro frue, venis la fino de tiu ĉi sukcesplena festvespero. J. v. W.

WINTERSWIJK
Secr.: Stationstraat 25

Lastatempe nia sekcio estas pli aktiva ol antaŭe. Dum la verda monato ni disdonis flugfoliojn, kaj 6 novaj kursanoj anoncis sin. En unu lernejo unu el niaj anoj instruas Esperanton al 50 infanoj. La konversacia vespero estas ĉiam bone vizitata de preskaŭ ĉiuj anoj. Ni aktive varbas F.L.E.-amikojn kaj ni havas preskaŭ 500.
La 27an kaj 28an de septembro okazis en nia vilaĝo la kernkurso de nia distrikto, kiu bone sukcesis kaj instigis la anojn daŭrigi la laboron por la Esperanto-movado.

SEKCIO ZAANDAM
Secr.: Gov. Flinckstraat 41, Tel. 4560

En kunlaboro kun la aliaj sekcioj en la Zaanregiono ni arangos „Zamenhof-kunvenon". Ĉi tiu kunveno okazos Dimanĉon la 14an de decembro en la salono „Ons Aller Belang" apud la Noorderburg posttagmeze de la 3a ĝis la 5.30a horo. Detalajn informojn ni ankoraŭ sciigos per loka gazetaro.
Ni atentigas la membrojn ke ili nepre ĉiun merkredon legu nian bultenon en „De Typhoon". Niaj informoj en tiu gazeto oficiale valoras.

 **S.A.T.-RONDOJ**

S.A.T. RONDO ARNHEM

Kunvenoj: Jaŭdon la 20an de novembro vespere je la 9a horo en „Opbouw", Velperweg 13. K-do A. Henstra pri: „S.A.T.-ideologio".
Dimanĉon la 14an de decembro matene je la 10½a horo, Taklaan 5. K-do W. Saaltink pri: „La enhavo de Sennaciulo".
Venu plimultnombre! Ankaŭ dimanĉe! Ankaŭ ne-S.A.T.-anoj estas bonvenaj! A. Henstra, Taklaan 5, Arnhem.

S.A.T.-RONDO ROTTERDAM

La roterdama S.A.T.-rondo kunvenis je la 12a de oktobro. K-do Van Haren vekis ĉies intereson per sia enkonduko pri „La perspektivoj de la Esperantismo". Ĉeestis ĉ. 70 gekamaradoj.

Diskutkunveno en Novembro!

Ni ree kunvenos je dimanĉo la 23a de novembro. K-do C. Coppens parolos pri „Prahistorio", temo interesa kaj instrua.
Ni atendas multajn vizitantojn. La kunveno okazos en la salono de Sekcio 1, Rusthoflaan 57 kaj komenciĝos je la 10a horo. Venu sufiĉe frue por ke ni havu sufiĉe da tempo por diskutado. C. v. E.

KORESPONDADO

Ni fondis *Korespondan Servon* de Esperanto-instituto de Finnlando, kiu transsendas prete skribitajn leterojn al esperantistoj, kies adresojn ni konas.
Ĉiu eksterlandano privata, kiu volas registrigi sian adreson en nia kartaro, sendu informojn pri sia aĝo, profesio, interesoj en letero. Tuj kiam ni trovos al li konvenan korespondanton, ni starigos la kontakton. Ĉiu kursgvidanto aŭ koresponda servo (centro) aŭ societo, kiu promesas disdoni Finnlandajn leterojn, bonvolu sendi al ni sian adreson kaj ĉian eblan noton pri la klientoj (anoj) aŭ eventuale la adresojn de siaj anoj. Ni servos al ili tute senpage, sed ni petas, ke ili ankaŭ volu senpage antaŭensendi la leterojn, kiujn ni sendos al ili. Ne estas al ni eble sendi respondkuponojn aŭ poŝtmarkojn (pro ŝtata malpermeso).
Reciproka kompensa servado estas la bazo de nia laboro internacia. Sur tiu bazo ni povos forte antaŭenigi la intereson al Esperanto per la ebleco korespondi.
Oni turnu sin al Esperanto-Instituto de Finnlando, Töölöntullinkatu 7 Helsinki.

Mi deziras korespondi kun nederlandaj samideanoj pri naturo, turismo, geografio, literaturo, Esp. movado, ŝako kaj aliaj temoj. Nowovol Franciszek, ul. Syrokomtik, *Rzeszow*, Polio.

Ivan Dimov, selo Glavaci—Vraĉansko, Bulgario, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kaj leterojn pri diversaj temoj, serĉas ankaŭ gekorespondemulojn por siaj samgrupanoj, gekursanoj kaj 10—14-jaraj lernantoj.

August Pensa, (estona k-do el Viljandi) nun en (13b) *Augsburg*, v; Richterhovenstr. 12 Germanio, deziras korespondadon, interŝanĝon de p.m., k.t.p., precipe kun samideanoj, kiuj antaŭ la milito korespondis kun li.

100 gesamideanoj deziras korespondadi kaj interŝanĝi p.k., p.m. k.t.p. Adreso: Esperanto-Asocio „Kompreno", (17b) *Konstanz*, Postfach 19 Germanio. Respondo garantiata!

 **ANONCOJ**

Geedziĝis:
A. M. BALKEMA
kaj
G. J. MINHOLTS
la 10an de novembro.
A 175, Oosterhoogebrug (Gr.).

AFRIKA REVUO

La sola E.gazeto aperanta sur la Nigra Kontinento. Tre interesa enhavo, pri vivo socia en Afriko, moroj, kutimoj ktp.
15 internaciajn poŝtajn respondkuponojn por unujara abono, oni sendu al redakcio: AFRIKA REVUO, Casablanca, Maroc, 5, rue Savorgnan de Brazza aŭ egalvaloron en guld. al LIBRO-SERVO DE F.L.E.